



Nur alportu vin mem

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

La teleroj alvenas per malregula pulso
kisante la plastan tablotukon,
kiun ili ne vidis ekde la kvardekan naskiĝtagon de Johano.

Kelkaj estas vestitaj per blanka maŝaro
rezerve kaŝante siajn vizaĝojn
kontraŭ la muŝoj, kiuj amindumas ilin,

aliaj eksudas sensamecon,
volvitaj en striktaj, travideblaj vestaĵoj,
malkaŝante ilian emon por segila rando.

Ĉiuj el la kutimaj gastoj estas ĉi tie,
ŝvitante malvarmetajn bidojn kontraŭ la varmeco:

terpoma salato, kies edzo forlasis ŝin
por alia viro...

brasiksalato, kiu rifuzas kundividi receptojn,
kustardkuko, kies filo mortis pasintan monaton
survoje hejmen el festo.

Duobla ĉokolada torto kaj fruktokuko
baldaŭ rekomencas malnovan debaton
dum cezara salato kaŝe eliras eksteren por fumaĵo.

Bifstekoj kaj kolbasoj gluiĝas al la kradrostilo,
ĉirkaŭitaj de la simpleco de biero kaj sunbrilo.

Mensogoj, kiujn mi rakontis

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

*Ĉi tiu estas magia balkono,
mi flustras malsupren al ŝi.*

**Mi drame turnas mian kapon
por kontroli ke ni estas solaj
(kvankam mi scias ke ni ja estas)
kaj klinas pli proksimen**

Se vi starus ĉi tie...

Mi staras tie, grava kaj sekretema

*je precize meznokto,
je la dua plenlumo
de iu monato, kiu havas tiun,*

**Mi gestas tiel,
kiel mi imagas ke sorĉisto gestus,**

*kaj kun malfermitaj okuloj,
flustrus, "lasu min tra!"
tiam malŝlosus la pordon ĉi tiel,*

**Ĝi sonas per metala klako,
kaj mi malrapide malfermas ĝin,**

*kaj sen kaŝobservanto,
paŝus eksteren ĉi tiel...*

**miaj nudaj piedoj etendiĝas zorge
al la ŝtoneta surfaco,
kaj ni paŝas tra la enirejo
al mia senverva griza balkono**

ĉio estas malsimila al ĉi tio!

**ŝi suspekteme rigardas
miajn malsanajn plantojn,
kaj mi komencas semi revojn:**

*ĉi tiu manrelo ne estas ĉi tie - ĝi sekvas
grandan marmoran ŝtuparon
kun dika, mola musko
tute kovrante la balustradon...*

*tie, kie tiu domo nun estas,
kaj tiu domo, kaj tiu ankaŭ,
estas bela ĝardeno, plena de floroj
kaj arbustoj, kaj heĝoj, kaj papilioj!*

**Kiaj floroj? Ŝi demandas,
kaj mi nomas ĉiujn specojn, kiujn
mi povas pripensi.**

*Preter la ĝardeno, tie,
estas arbaro - sed ne kiel niaj arbaroj -
ĝi estas pli verda, pli dika kaj plenplena
de multaj strangaj kaj amikaj estaĵoj.*

*Mi renkontis feinon en tie iufoje,
mi diras, fingromontrante al la plej
malproksimaj tegmentoj,
ŝi kantis por mi kanton tiel belan
ke floroj ekfloris ĉirkaŭ ni por aŭskulti.*

**Mi daŭras fekundigi ŝian imagon,
korplene rememorante magian keston
el mia propra infanaĝo, kaj scivolemas
kiel miaj mensogoj kreskos.**